MAZI EN GONDOLANDO

Parto 1

Sceno 1 unu

Os personagens se apresentam.

Reĝo: Bonan tagon! Mi estas Reĝo.
Mi estas la Reĝo de Gondolando.

Reĝino: Bonan tagon! Mi estas Reĝino.

A princesa passa patinando.

Silvja: Saluton! Mi estas princino Silvja!

Karlo trabalha no jardim. Vive sonhando com Silvja.

Karlo: Silvja, Silvja!
Saluton! Mi estas Karlo.
Mi estas ĝardenisto.

Korvaks, o primeiro ministro do rei, entra.

Korvaks: Saluton! Mi estas Korvaks.

Ele dá ao rei um papel impresso.

Reĝo: Dankon, Korvaks.

Mazi, o alienígena peludo, assiste de sua nave espacial.

Mazi: Saluton! Mi estas Mazi! Granda Mazi!

Petro passa andando de bicicleta.

Petro: Bonan matenon!

Reĝo: Bonan matenon!

Gramática e estruturas

Substantivos terminam em - o.

- Reĝ**o**, ĝardenist**o**

"Mi estas (la) **-o**."
Mi estas ĝardenist**o**.
Mi estas la Reĝ**o** de Gondolando.

Sceno 2 du

Canção: Cumprimentos (Salutoj)

Petro: Bonan matenon. Mi estas Petro.
Bonan matenon! *(x 4)*
Bonan tagon! *(x 5)*
Bonan vesperon! *(x 3)*

Bonan nokton!

Luno: Bonan nokton.

Suno: Bonan...

Luno: ...nokton.

Uma pausa para introduzir kiu e kio:

"Ki**u** vi estas?"
Karlo: Mi estas Karlo.

"Ki**o** vi estas?"

Karlo: Mi estas ĝardenisto.

Sceno 3 tri

Os personagens falam de seus atributos.

Reĝo: Mi estas forta!
Reĝino: Mi estas dika.
Dika. Dika. Dika!
Silvja: Mi estas bela.
Korvaks: Mi estas saĝa.
Karlo: Mi estas kuraĝa.

Uma pausa para introduzir - a e kia.
Kia vi estas?

Reĝo: Forta.
Reĝino: Dika.
Silvja: Bela.
Korvaks: Saĝa.
Karlo: Kuraĝa.
Reĝino: *(al la Reĝo)* Vi estas forta.
Reĝo: Jes, forta. *(al la Reĝino)* Vi estas dika.
Reĝino: Jes, dika.
Karlo: *(pri Silvja)* Kaj ŝi estas bela.
Korvaks: Jes, vi pravas!
Silvja: *(pri Karlo)* Li estas kuraĝa, kaj saĝa.
Korvaks: Ne, ne! Mi estas saĝa! Mi estas saĝa! Saĝa! Saĝa!
Ĉiu: Forta, dika, bela, saĝa, kuraĝa!
Mazi: Ha! Mi estas granda! Granda Mazi!

Gramática

Adjetivos terminam em - a.
- Bon**a**, bel**a**, fort**a**

"Mi estas **-a**."

Mi estas kuraĝ**a**.
Mi estas saĝ**a**!

pronomes: **mi, vi, li, ŝi, ĝi**.

"Li/Ŝi estas **-a**."

"**Kia**?" " — **-a**."
Kia estas la Reĝo? —Fort**a**.
Kia estas Karlo? —Li estas kuraĝ**a**.

"Jes, vi pravas."

Sceno 4 kvar

Mazi: Granda!
Kato: Malgranda.
Mazi: Mi estas granda Mazi.
Kato: *(al Mazi)* Granda.
Mazi: *(al la kato)* Malgranda.
Kato: Granda.
Mazi: Malgranda.
Reĝo: *(palaco)* Granda.
Karlo: *(domo)* Malgranda.
(ĉemizo) Granda. Malgranda.
Mazi: Kaj mi estas Granda Mazi!

GRANDA

A a

malgranda

Gramática e estruturas
O prefixo -mal dá o sentido oposto.
- granda = *grande*
- **mal**granda = *pequeno*

Tempo presente: raiz + as
est- + **-as** = estas

Sceno 5 kvin

Sylvia se prepara para fugir com Karlo.

Silvja: Ŝŝŝ! Jen sako. Granda sako! Jen mapo. Jen sandviĉo.



Pausa.

Kio estas ĝi? —Ĝi estas sandviĉo.

Karlo com uma motocicleta.



Karlo: Jen motorciklo. Motorciklo!

Korvaks digita em um computador.

Korvaks: Jen komputilo!

Estrutura de sentenças

"Kio estas ĝi?" "—Ĝi estas **-o.**"
Kio estas ĝi? —Ĝi estas mapo.

"Jen **-o**."
Jen komputilo.
Jen motorciklo.

Sceno 6 ses

O gato brinca com o computador.

Prunoj

Persikoj

Vinberoj

Kato: Miaŭ! Pruno, persiko, vinbero.
Pruno, persiko, vinberoj.
Pruno, pruno, pruno!
Tri prunoj! Mi gajnis! Miaŭ!
Prunoj, prunoj, prunoj!

Gramática

Plural dos substantivos: ***-j***
- pruno + pruno = prunoj

Tempo passado: ***-is***
- Mi gajnis.

Sceno 7 sep

O rei e a rainha estão no jardim.

Reĝo: Jen ĝardeno. Rigardu!
Jen ŝrunoj. Jen persikoj.
Jen vinberoj.

Reĝino: Mi ŝatas prunojn.
Mi ŝatas persikojn.
Mi ŝatas vinberojn.

Reĝo: Ankaŭ mi ŝatas vinberojn.

Silvja chega.

Objeto direito de verbo transitivo: ***-n***
Jen persiko.
- Ĝi estas persiko.
- Mi **petas** persikon.

O plural também leva ***-n***
Jen persikoj..
- Mi **ŝatas** persikojn.

Silvja: Saluton Panjo! Saluton Paĉjo. Mi petas persikon.

Sceno 8 ok

Petro vai a um restaurante.

Petro: Mi estas malsata.
(al la kelnero) Bonvolu doni al mi sandviĉon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi salaton.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi sukon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi glaciaĵon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi akvon.

Kelnero: *(ridas)*

Gramática e estruturas.

Infinitivo: ***-i*** *(ex.:* don**i***)*
Imperativo: ***-u*** *(ex.:* don**u***)*
Impertavito com um segundo verbo: ***-u -i***
"Bonvol**u -i** ..."
Bonvol**u** don**i** al mi glaciaĵon.
"Donu al mi **-on.**"
Donu al mi sandviĉ**on**!

Sceno 9 naŭ

Silvja pega algumas frutas para sua fuga.

Silvja: Mi petas persikon, Paĉjo.

Reĝo: Jes! *(al la Reĝino)* Persikon!

Reĝino: Jen persiko.

Silvja: Dankon. Donu al mi prunon kaj vinberojn.

Reĝo: Jes. *(al la Reĝino)* Prunon kaj vinberojn!

Reĝino: Jen pruno kaj vinberoj.

Silvja: Dankon!

Sceno 10 dek

Korvaks ordena Karlo a contar árvores, etc., no jardim.

Korvaks: Karlo!

Karlo: Jes?

Korvaks: Arboj!

Karlo: Arboj?

Korvaks: Jes. Kiom da arboj estas? Kalkulu!

Karlo: Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek.

O gato fala com o computador.

Kato: Kiom da arboj estas?

Komputilo: Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek.

Gramática e estruturas

Numerais 1-10

Kiom da...? *(uma parte do todo)*
□ Kalkulu, **kiom da** arboj estas?

De volta ao jardim.

Korvaks: Arbustoj! Kiom da arbustoj estas?

Karlo: Kiom? Du, kvar, ses, ok, dek!

Korvaks: Kaj kiom da floroj estas?

Karlo: Floroj?

Korvaks: Jes, jes! Kiom da floroj estas?

Karlo: Dek? Kvindek? Cent?
Mi ne scias!

Mi ne scias.

Sceno 11 dek unu

Petro chega em uma encruzilhada.

Petro: Mi ne scias.

Sceno 12 dek du

Karlo conta as flores.

Karlo: Cent sep! Cent ok...
Silvja: Cent naŭ!
Karlo: Cent dek!

Números: 11-100 - 1000
dek unu - cent - mil

Silvja: Karlo, Donu al mi rozon,
...mi petas! Dankon!
Mi amas rozojn!

Karlo: Kaj mi amas vin!

Silvja: Ho, rigardu! Mi havas rozon. Mi havas prunon, persikon kaj vinberojn.
Mi havas sandviĉon kaj mapon.

Karlo: Kaj mi havas... motorciklon!
Mi amas vin!

Silvja: Mi amas vin!

Ambaŭ: Ek! Ek!

Korvaks: Ne! Ne! Ne!
Mi amas la princinon.
Mi amas Silvjan!

Verbos transitivos
...-as -on.
Mi **havas** roz**on**.
Mi **havas** map**on**.
Mi **amas** la princin**on**.

Sceno 13 dek tri

Karlo kaj Silvja motorciklas.



Silvja: A, E, I, O, U
Ni forkuru!
A, U, O, I, E
Kuraĝe!

Karlo: A, E, I, U, O
Ek antaŭen do!
I, O, U, E, A

Ambaŭ: Hura, hura, hura!

Silvja: A, U, I, O, E

Karlo: Mi vin amas tre!

Silvja: E, I, O, U, A

Ambaŭ: Mi amas...
A, E, O, U, I
Mi amas vin!

Pronomes como objetos direitos.
- mi**n**, vi**n**
- Mi amas vi**n**.
  Sekvu mi**n**.

ordem das palavras:
Mi**n** amas vi.
Mi vi**n** amas.

Reĝo: La ĝardenisto amas la princinon?

Korvaks: Jes, jes!

Reĝo: Ne, ne, ne!

Reĝino: La princino amas la ĝardeniston?

Korvaks: Jes, jes!

Reĝino: Ne, ne!

Reĝo: Ni iru. Sekvu min! Ek!

Reĝo kaj Korvaks: Ĝis revido!

Sceno 1

Karlo kaj Silvja motorciklas.

Karlo: Saluton!

Silvja: Saluton! Paĉjo, Panjo!

Karlo: Korvaks!

Reĝo: Silvja! Silvja!

Silvja: Ho, Panjo!

Reĝo: *(al Karlo)* Grrrr!

Karlo: Mi amas princinon Silvja.

Reĝo: Arestu lin!

Korvaks: Arestu lin!

Generalo: Arestu lin!

Oficiro: Arestu lin!

Suboficiro: Arestu lin!

Soldatoj: Arestu lin! Arestu lin! Arestu lin!...

Reĝo: Dankon, Korvaks.

Imperativo (-u) para ordens. (-n) para o objeto direito.
- Arestu li**n**!

Sceno 2

En la malliberejo.

Oficiro: Nomo?
Karlo: Karlo.
Oficiro: Aĝo?
Karlo: Dudek.
Oficiro: Profesio?
Karlo: Ĝardenisto.
Oficiro: Forkonduku lin.
Korvaks: Numero dek naŭ.
Oficiro: Numero dek naŭ?
Oficiro: *(al la gardistoj)* Numero dek naŭ!
Gardistoj: Numero dek naŭ?
Gardistoj: Naŭ.
Dek.
Dek unu.
Dek du.
Dek tri.
Dek kvar.
Dek kvin.
Dek ses.
Dek sep.
Dek ok.
Dek naŭ.
Dudek.
Ho! Dek naŭ!

En la ĉelo.

Karlo: Ah! Monstro!
Mazi: Saluton. Mi estas Mazi. Granda Mazi.

Sceno 3

LA RAKONTO DE GRANDA MAZI



La kosmoŝipo de Mazi foriras.

Mazi: Mi estas malsata.
Mi estas malsata!
Mi estas malsata!

Mazi malfermas skatolon kaj manĝas horloĝon.

Mazi: Mmmm!
Bongusta!
Bongusta!
Mi ŝatas horloĝojn!

La skatolo estas malplena kaj Mazi serĉas manĝaĵon.

Mazi: Mi estas malsata!
Vendisto: Fruktoj, fruktoj!
Bongustaj fruktoj!
Mazi: Kio estas ĝi?
Vendisto: Frukto.

Adjetivos e substantivos (revisão)
***-a*... *-o*...**
Ĝi estas bongust**a** frukt**o**.
***-aj*... *-oj*...**
Ili estas bongust**aj** frukt**oj.**
***-ajn*... *-ojn*...**
Mi ŝatas bongust**ajn** frukt**ojn**.

Sceno 4

A: Kio estas ĝi?

B: Mi ne scias.

A: Ĝi estas biciklo. Kio estas ĝi?

B: Mi ne scias.

A: Ĝi estas kosmoŝipo. Kio estas ĝi?

B: Ĝi estas horloĝo.

A: Kio estas ĝi?

B: Ĝi estas horloĝo.

A: Ne. Ĝi estas parkhorloĝo.

B: Kio estas ĝi?

A: Ĝi estas skribmaŝino.

B: Ne. Ĝi estas komputilo.

Possessivo = pronome + (-a)
Jen la libro de vi. Ĝi estas vi**a** libro.
Jen mi**a** sonorilo.

Possessivos são adjetivos, portanto terminam em -a.
Mi ŝatas li**an** biciklon.
Vi havas ŝi**ajn** librojn.

A kaj B: Kio estas ĝi?
Ĝi estas kato.

Kato: Kio estas ĝi? Kio estas ĝi?

Petro: Ĝi estas mia sonorilo. Mia sonorilo.
Ĝis!

Sceno 5

Mazi: Kio estas ĝi?

Vendisto: Ĝi estas pruno. Manĝu ĝin!

Mazi: Mi ne ŝatas ĝin!

Vendisto: Rigardu! Manĝu tion!

Mazi: Kio ĝi estas?

Vendisto: Ĝi estas persiko. Gustumu ĝin!
Ĝi estas bongusta! Manĝu ĝin!

Mazi: Terure!
Mi ne ŝatas tion!
Ĝi estas malbongusta!
Mi ne ŝatas ĉi tion,
kaj mi ne ŝatas tion!

Forma negativa dos verbos:
- Mi ŝatas ĝin.
  Mi **ne** ŝatas ĝin.
  Manĝu ĝin!
- **Ne** manĝu ĝin!

Sceno 6

Petro: Ĉi tio. Tio.

Korvaks: Ĉi tio. Tio.

Petro: Ĉi tio. Tio.

Pronome demonstrativo: **tio**
Tio = *" aquela coisa"*

Ĉi *denota proximidade:*
- **Ĉi** tio = ***"esta coisa"***

Sceno 7

Ĉe la fruktobudo.

Mazi: Mi ne ŝatas ĉi tion, kaj mi ne ŝatas tion.
Mi ne ŝatas ĉi tion, kaj mi ne ŝatas tion.
Mi ne ŝatas ĉi tion, kaj mi ne ŝatas tion.
Ho! Kio estas tio? Kio estas tio?

Vendisto: Kio?

Mazi: Ĉi tio!
Vendisto: Ĉi tio estas parkhorloĝo.
Mazi: Parkhorloĝo?
Vendisto: Jes, ne... *(fuĝas)*
Mazi: Bongusta! Mi ŝatas ĉi tion! Mi ŝatas parkhorloĝojn!

En la malliberejo.

Oficiro: Nomo?
Mazi: Errr...
Oficiro: Nomo? Nomo? Via nomo?
Mazi: Mazi. Ne. Granda Mazi!
Oficiro: Aĝo?
Mazi: *(li manĝas la skribmaŝinon)* Bongusta!
Oficiro: Forportu lin! Forportu lin! Forportu lin!

Sceno 8

Mazi: *(al Karlo)* Saluton!
Karlo: Kiu vi estas?
Mazi: Mi estas Mazi! Saluton! Mi estas amiko.
Kiu vi estas? Via nomo?

Karlo: Ka... Ka... Ka... K...
Mazi: Kio estas via nomo?
Karlo: Karlo! Kiu estas vi?

Nomo> *substantivo.Pergunta-se com* **kio***:*
K**io** estas via nom**o**?

Kiu vi estas? —Karlo!
Kio estas via nomo? —Karlo!

Preposição **por** *(= "para, por")*

Ĝi estas via letero. Ĝi estas por vi.

Sceno 9

Karlo portas leterojn.

Petro: Kiu vi estas?
Reĝo: Mi estas Reĝo.
Petro: Ne, ĝi ne estas por vi.
(al la Reĝino) Kiu vi estas?
Reĝino: Mi estas Reĝino.
Petro: Ne, ĝi ne estas por vi.
(al Korvaks) Kiu estas ŝi?
Korvaks: Ŝi estas princino Silvja.
Petro: Ne, ĝi ne estas por ŝi.
(al la princino) Kiu estas li?
Silvja: Li estas Korvaks.
Petro: Ĉu vi estas Korvaks?
Korvaks: Jes, ĝuste, jes!
Petro: Jen letero por vi.
Bonvolu!
Korvaks: Dankon. Ho! Kiu estas vi?
Petro: Mi estas Petro. Ĝis!

Nota: Na história, **Reĝo** *e* **Reĝino** *são tanto nomes assim como títulos. Ao lhe perguntarem* "Ki**u** estas vi?"*, ele respondeu* "Mi estas Reĝo" *porque* Reĝo *é o seu nome. Ele responderia da mesma forma a* "Ki**o** estas vi?"

Sceno 10

Mazi kaj Karlo en la malliberejo.

Mazi: Nu, kiu vi estas?

Karlo: Mi estas Karlo, ĝardenisto.
Kiu vi estas? De kie?

Mazi: De tie! De la kosmo!

Karlo: De la kosmo?

Mazi: Jes! Mi estas de tie!
De la kosmo! De tie!

El *= de*
- *Similar a* ***de*** *(de, desde)*
- *Usado para indicar origem:*

El kiu lando vi estas?
—Mi estas el Francio.

Sceno 11

Petro intervjuas biciklistojn.

Petro: El kiu lando vi estas?

1a biciklisto: El Francio!

Petro: El kiu lando vi estas?

2a biciklisto: El Britio!

Petro: El kiu lando vi estas?

3a biciklisto: El Germanio!

Petro: El kiu lando vi estas?

4a biciklisto: El Italio!

Petro: El kiu lando vi estas?

5a biciklisto: El Grekio!

6a biciklisto: Mi estas el Japanio!

Petro: Ĝis!

Sceno 12

Denove en la malliberejo.

Mazi: Mi venis de tie.
Nun mi estas ĉi tie.

Karlo: Ankaŭ mi... Ho, Silvja!

Mazi: De tie! De la kosmo!

Karlo: De la kosmo?

Mazi: Jes! Mi estas de tie!
De la kosmo! De tie!

Sceno 13

Aboco - literumado.

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff,
Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ

Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr,
Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz

Nomes das letras:

a, bo, co, ĉo,
do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo,
ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro,
so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

Sceno 14

Korvaks: Silvja!

Silvja: Ĉesu, Korvaks! Foriru! Mi amas Karlon!

Korvaks: Mi amas vin, Silvja!

Silvja: Ho, iru for!

Korvaks: Haltu! Silvja! Haltu! Revenu! Ho Silvja, haltu! Revenu!

Silvja: Korvaks! Iru for!

Sceno 15: Haltu! Venu! Rigardu! Aŭskultu! Foriru!

Sceno 16

Korvaks: Ho Silvja, Silvja!

Sceno 1

Korvaks estas ĉe la komputilo.

> *Plural dos pronomes possessivos:*
> - via → viaj
>
> Viaj okuloj estas belaj.

Korvaks: *(al la kato)* Iru for!
Ho Silvja, mi amas vin!
Bone! Korvaks amas Silvjan!
Ho! Silvja! Viaj okuloj... viaj...

Korporpartoj sur la ekrano.

Komputilo: La korpo:



Sceno 2

> *Terminação adverbial:* **-e**
> (Mi faris tion) bon**e**!
> = *(Eu fiz isso) ‹muito› bem!*
>
> *Sufixo aumentativo:* **eg**
> - Bon**eg**e! = *Excelente!*

Korvaks: Bone! Bone!
Mia Silvja!
Nun mi havas vin! Ek!
Bone! Bonege!

Korvaks kisas la bildon.

Korvaks: Ho! Kie ĝi estas?
Ho... ĉi tie! Kaj tio! Kaj tio!
Nun, kie? Ho, ĉi tie!
Nun, ek!

Aperas Silvja.

Silvja! Mia Silvja!

Nun mi havas vin!

Sceno 3

Karlo: Ni estas amikoj.

Ambaŭ: Kune vi kaj mi
Amikoj estas ni.
Mi kaj vi,
Pli kaj pli,
Amikoj estas ni! *(ripeto)*

Du amikoj ni!

Karlo: Rigardu!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, tion, supre!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, bongustaj stangoj!

Mazi: Ho, ne. Dankon, ne!

Karlo: Jes! Manĝu la stangojn!
Unu, du, tri, kvar, kvin!
Ni estas liberaj!
Vi estas libera kaj ankaŭ mi!
Ni estas liberaj!

Mazi: Libera vi, libera mi, liberaj estas ni!

Karlo: Liberaj ni, vi kaj mi, Liberaj estas ni!

Mazi: Liberaj...

Karlo: Estas ni! Ek!

Ili saltas el la malliberejo

Ambaŭ: Mi kaj vi...

Mazi: Mi estas libera! Mi sentas...
malvarmon, malsaton, sed mi estas libera!

Sceno 4

Petro: Malvarma!
Varma!
Malsata!
Soifa!
Malseka!
Seka!



Sceno 5

Petro: Mi soifas!

Virino: Trinku akvon!

Petro: Tre varma!

Virino: Pardonu!

Petro: Mi malsatas.

Virino: Manĝu sandviĉon!

Petro: Mi ŝvitas!

Virino: Duŝu vin!

Petro: Mi malsekas!

Virino: Viŝu vin!

Petro: Mi sentas malvarmon.

Virino: Surmetu puloveron.

Petro: Mi estas laca!

Virino: Ripozu!

Sceno 6

Mazi: Brrr! Mi malvarmas! Karlo!
Karlo? Kie vi estas? Karlo!

Karlo: Mazi!

Mazi: Karlo! Kie vi estas?

Karlo: Ĉi tie!

Mazi: Kie? Mi ne vidas vin!

Karlo: Mi estas ĉi tie, sur la arbo.

Mazi: Sur kiu arbo?

Karlo: Sur la arbo... sub kiu vi staras? Aj! *(li falas)*

Mazi: Mi estas... sub...

> ***Kiu** quer dizer "qual"*
> □ Sur **kiu** arbo?
> Sur la arbo, sub **kiu** vi staras!

Sceno 7



Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Sub la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Sur la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: En la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Antaŭ la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Malantaŭ la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Inter la kestoj.

Voĉo: Kie estas la kesto?

Petro: Tie!

Voĉo: Kie la kesto estas nun?

Petro: Ĉi tie!

Sceno 8

Karlo kaj Mazi apud la rivero.

Karlo: Kiel vi fartas?
Kiel vi fartas?

Mazi: Tre bone! Kvankam mi estas malseka kaj malsata!
Kie estas la palaco?

Karlo: Jen, tie!

Mazi: Kie?

Karlo: Rigardu, ĝi estas tie!
Ho, la palaco!
(suspiro) Silvja estas tie!

> ***Kiel** = Como, de que forma, de que maneira*
> □ Kiel vi fartas? —Mi fartas bone.
>
> ***Tiel** = desta forma, desta maneira, assim, tão*
> □ Portu ĝin tiel. *(Carregue isto assim.)*
> □ Vi manĝis tiel rapide! *(Você comeu tão rápido!)*

Sceno 9

En la komputilejo.

Korvaks: Mi estas Korvaks! Aŭskultu! Ĉu vi aŭdas min?

Pseŭdo-Silvja: *(kapjesas)* Mmmm.

Korvaks: Nun! Ĉu vi vidas min?

Pseŭdo-Silvja: *(kapjesas)* Mmmm.

Korvaks: Ĉu vi parolas?

Pseŭdo-Silvja: Esperante!

Korvaks: Nun, provu iri!

Pseŭdo-Silvja: Mi ne povas.

Korvaks: Mi provas denove! Nun. Ĉu vi povas paŝi?

Pseŭdo-Silvja: Jes, mi povas.

Korvaks: Ĉu vi povas kuri?

Pseŭdo-Silvja: Ne, mi ne povas.

Korvaks: Mi provas denove. Silvja, ĉu vi... amas min?

Pseŭdo-Silvja: Ne. Mi ne amas vin. Mi malamas vin!

Korvaks: Ho, Silvja!

Pseŭdo-Silvja: Ho, nun mi povas kuri! Ĝis revido!

Korvaks: Silvja! Haltu! Revenu! *(Li batas la komputilon.)* Kio okazas? *(La komputilo produktas 6 Silvja-kopiojn.)*

Sceno 10

Kanto de la Pseŭdo-Silvjaj...



Pseŭdo-Silvja 1: Paŝas mi.
Pseŭdo-Silvja 2: Parolas mi.
Pseŭdo-Silvja 3: Aŭdas mi.
Pseŭdo-Silvja 4: Vidas mi.
Pseŭdo-Silvja 5: Mi estas vi.
Pseŭdo-Silvja 6: Vi estas mi.
Pseŭdo-Silvja 2: Ĉu vi estas mi?
Pseŭdo-Silvja 1: Saltas mi.
Pseŭdo-Silvja 2: Naĝas mi.
Pseŭdo-Silvja 3: Kuras mi.
Pseŭdo-Silvja 4: Dancas mi.
Pseŭdo-Silvja 5: Mi estas vi.
Pseŭdo-Silvja 6: Vi estas mi.
Ĉiuj: Kiuj estas ni?
Petro: Kiu estas vi?
Pseŭdo-Silvjaj 1-6: Mi estas Silvja! Mi estas Silvja! ...
Petro: Ĉiu estas Silvja?
Ĉiuj: Jes, ĉiu!
Petro: Ĉu ĉiu?
Ĉiuj: Jes!
Viro: Kiuj estas ili?
Petro: Silvjaj!
Korvaks: Ses Silvjaj! Ahhh!

Tiu/tiuj, ĉiu/ĉiuj

Tiu	*esse, essa, aquele, aquela*
Tiuj	*esses, essas, aqueles, aquelas*
Ĉiu	*todo, cada, cada um*
Ĉiuj	*todos, todas*

Sceno 11

Kanto: "Belaj roboj"



Pseŭdo-Silvja 1: Via robo verda.
Pseŭdo-Silvja 2: Via robo ruĝa.
Pseŭdo-Silvja 3: Ŝia robo blua.
Pseŭdo-Silvja 4: La brunan havas mi!
Pseŭdo-Silvja 5: Vere moda, bela, rava
Estas mia robo flava!
Pseŭdo-Silvja 6: Tute plaĉa estas ankaŭ
Mia robo nigra-blanka.
Pseŭdo-Silvja 1: La brunan ŝatas mi!
Petro: Ĝis revido!

Advérbios

- *Em Esperanto, advérbios são usados onde geralmente podemos*
- *usar uma preposição e um substantivo em Português.*

- Mi parolas Esperant**e.** *(Estou falando em Esperanto.)*
- Li laboras nokt**e**. *(Ele trabalha à noite.)*
- Ekzempl**e**... *(Por exemplo...)*

Estrutura de sentenças com mais de um verbo: -as -i, -u -i

- Ĉu vi pov**as** kur**i**?
  Nun, prov**u** ir**i**!
  Kion vi vol**as** manĝ**i**?

Verbos sem sujeito*: *"verbos impessoais"

- *Como em Português, em Esperanto os verbos também podem*
- *ser impessoais. Exemplo: " Está chovendo" .*

- Pluvas! *(Está chovendo!)*
- Estas sune. *(Está ensolarado.)*

Sceno 1

En la palaca ĝardeno.

Silvja: *(Ŝi kantas)* Kapo, ŝultroj, kruroj du, piedoj du!
Vidu, aŭdu, spiru plu, pli kaj plu!
Por muskoloj, por artikoj, bona estas gimnastiko...
Mazi: Kie ni estas?
Karlo: Ni estas en la ĝardeno.
Mazi: Kie? En via ĝardeno?
Karlo: Ne! En la Reĝa ĝardeno. Ha! Tie estas Silvja!
Mazi: Kion ŝi faras?
Karlo: Ŝi gimnastikas!
Silvja: ...bona estas gimnastiko... Ŝŝ! Kaŝu vin malantaŭ tio!
Karlo: Malantaŭ kio?
Silvja: Malantaŭ la statuo. Ĉu vi fartas bone?
Karlo: Ne, malbone! Ni estas malsataj.
Ĉu vi havas ion por manĝi?

Mazi: Ĉu vi havas horloĝon por mi?
Silvja: Horloĝon?
Mazi: Pardonu!
Karlo: Jes, horloĝon! Li ŝatas horloĝojn!
Silvja: Ŝŝ! Iu venas!
Mazi: Kiu paŝas?
Karlo: Mi ne scias. Mi vidas nenion. Ŝŝ! Bone!
Ho ne! Pluvas.

Silvja: Rigardu. Atendu min tie!
Karlo: Bone!
Silvja: Atendu! Mi venos.
Karlo: Kiam?
Silvja: Vespere, je la sepa horo vespere.
Karlo: Je la sepa. Bone.
Mazi: Kioma horo estas nun?

Sceno 2

Horloĝo sonas.

Voĉo: Estas la oka horo.
Petro: *(telefone)* Halo? Ne, mi ne havas tempon. Mi matenmanĝas.

Voĉo: Estas la unua horo.
Petro: Halo? Ne, mi ne havas tempon. Mi tagmanĝas.

Voĉo: Estas la sepa horo.
Petro: Halo? Ne, mi ne havas tempon. Mi vespermanĝas.

Voĉo: Estas la naŭa horo.
Petro: Halo? Ne, mi ne havas tempon. Mi banas min.

Voĉo: Estas la deka horo.
Petro: Halo? Ne, ne! Mi iras dormi. Bonan nokton!

Sceno 3

Denove en la palaco.

Reĝino: La unua horo.
Estas tempo por tagmanĝi!
(Al la Reĝo) Tagmanĝo, kara!

Reĝo: Tuj mi venos!

Reĝino: Tagmanĝo, Silvja!
Silvja: Mi fartas malbone.
Mi manĝos en mia ĉambro.

Reĝino: Kio doloras vin?

Silvja: Mi havas fortan kapdoloron.

Sceno 4

Petro estas kuracisto, kaj li akceptas pacientojn.

Voĉo: Kapdoloro, stomakdoloro, dentdoloro, dorsdoloro.

Petro: Envenu! Kio doloras vin?
Paciento 1: Mi havas fortan kapdoloron.
Petro: Kapdoloron? Jen medikamento.
Paciento 1: Mi dankas vin!

Petro: Sekva! Kio doloras vin?
Paciento 2: Mi havas stomakdoloron.
Petro: Stomakdoloron? Jen medikamento.
Paciento 2: Mi dankas vin!

Petro: Sekva! Kio doloras vin?
Paciento 3: Mi havas fortan dentdoloron.
Petro: Dentdoloron? Jen medikamento.
Paciento 3: Mi dankas vin!

Petro: Sekva! Kio doloras vin?
Paciento 3: Mi havas dorsdoloron.
Petro: Dorsdoloron? Jen medikamento.
Paciento 3: Mi dankas vin!

Números ordinais: ***a***
 unu + a = unua. *(primeiro)* du + a = dua *(segundo)*

Kioma - *falando as horas:*

Kioma horo estas? —Estas la oka horo.
La oka (horo) (kaj) tridek (minutoj)
= La oka tridek

Sceno 5

La ĉambro de Silvja en la reĝa palaco.

Reĝino: Vi havas kapdoloron?
Iru en vian ĉambron kaj ripozu!
(Al servistoj) La princino tagmanĝos en sia ĉambro!
(Al la Reĝo) Silvja malbone fartas, ŝi havas kapdoloron.

Reĝino: Ŝi havas kapdoloron. Ŝi tagmanĝos en sia ĉambro.

si = *pronome reflexivo para 3a. pessoa (li/ŝi/ili/ĝi):*

- Mi manĝas en mia ĉambro.
  Vi manĝas en via ĉambro.
  Ŝi manĝas en **sia** ĉambro. *(e não ŝia !)*

  Li manĝas **sian** pomon. *(Ele come sua [própria] maçã.)*
- Li manĝas lian pomon.*(Ele come sua maçã [de outra pessoa].)*

Sceno 6

Reĝino: Lia.
Reĝo: Ŝia. Ŝia tranĉilo.
Reĝino: Lia tranĉilo. Lia forko.
Reĝo: Ŝia forko. Ŝia glaso.
Reĝino: Lia glaso. Lia telero.
Reĝo: Ŝia bovlo.
Reĝino: Lia krono.
Rego: Ŝia krono.

-n *pode mostrar movimento em direção a algo.*

- Silvja iras al la ĝardeno. Ŝi iras tie**n**.
  Kie**n** vi iras? —Mi iras **al** la naĝejo.

Sceno 7

Silvja en la dormoĉambro.

Silvja: Kapdoloro! Ho!

Ekster la palaco unu Pseŭdo-Siljva paŝas preter la Reĝino.

Reĝino: Saluton, Silvja!
Ĉu vi ankoraŭ malsanas?
Pseŭdo-Silvja: Mi? Malsanas?!
Ne, mi estas tute sana!
Reĝino: Kien vi iras?
Pseŭdo-Silvja: Mi iras al la naĝejo. Ĝis!
Reĝino: Agrablan naĝadon, kara!

Alia Pseŭdo-Silvja paŝas preter la Reĝo.

Reĝo: Saluton, Silvja! Kiel vi fartas nun?
Ĉu pli bone?
Pseŭdo-Silvja2: Ĉu pli bone? Ho, jes!
Reĝo: Bone, bone, bone. Kien vi iras nun?
Pseŭdo-Silvja2: Mi iras al la tenisludejo. Ĝis!
Reĝo: Agrablan ludadon, kara!
(Al la Reĝino) Silvja jam pli bone fartas. Ŝi ludas tenison.
Reĝino: Ĉu ŝi ludas tenison?
Ne, tute ne! Ŝi naĝas nun!

Tria Pseŭdo-Silvja preter-rajdas sur ĉevalo.

Pseŭdo-Silvja3: Saluton Panjo! Saluton Paĉjo! Ĝis!

Mais exemplos de direcionamento com **-n**

- Mazi saltis en la rivero *(Mazi estava dentro do rio pulando.)*
- Mazi saltis en la rivero**n**. *(Mazi pulou para dentro do rio.)*

Sceno 1

En la komputilejo.

Korvaks: Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias?
Ho! Jes, ĝi funkcias.

Komputilo: Bonan vesperon!

Korvaks: Kiom da princinoj ekzistas?

Komputilo: Ses.

Korvaks: Ne! Ili estas sep!

Sceno 2

Karlo kaj Mazi en la dometo de la palaca ĝardeno.

Karlo: Ĉu ankoraŭ pluvas?

Mazi: Ne, nun estas bela vetero.
Karlo: Jam malheliĝas.
Mazi: Kioma horo?
Karlo: Estas preskaŭ la sepa.
Kaj jam malheliĝas!
En aŭtuno, malheliĝas je la sepa.
Mazi: En aŭtuno?

-iĝ *= tornar-se, ficar, vir a ser*

- hela *(= claro),* heliĝi *(= clarear-se)*
- plena *(= cheio),* pleniĝi *(= ficar cheio, encher-se)*

Je kioma...?

- Kioma horo estas? —Estas la sesa.
  Je kioma horo malheliĝas? —Je la 7-a (horo).

Sceno 3

Sezonoj kaj monatoj

Petro: En aŭtuno malheliĝas je la sepa.
En vintro malheliĝas je la kvina.
En printempo malheliĝas je la sepa.
En somero malheliĝas je la naŭa.

hela, malhela
heliĝas, malheliĝas

Voĉo: Septembro, Oktobro, Novembro,
Decembro, Januaro, Februaro,
Marto, Aprilo, Majo,
Junio, Julio, Aŭgusto

Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo,

Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro,
Novembro, Decembro.

Sceno 4

Nomoj de la semajnotagoj

lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo

Sceno 5



ĵurnalisto: Kiam vi ludas futbalon?
Petro: Lunde.
ĵurnalisto: Kiam vi ludas korbopilkon?
Edzino: Marde.
ĵurnalisto: Kiam vi rulsketas?
Petro: Merkrede.

Ĵurnalisto: Kaj kiam vi gimnastikas?
Edzino: Jaŭde.
Ĵurnalisto: Kiam vi kutimas naĝi?
Petro: Vendrede.
Ĵurnalisto: Kiam vi ludas golfon?
Edzino: Sabate.
Ĵurnalisto: Kiam vi ludas tenison?
Petro: Dimanĉe. Dimanĉo estas hodiaŭ.
Edzino: Hodiaŭ ni ludas tenison.

Tempaj adverboj: -e

- Kiam? —Lund**e** (je lundo)

Sceno 6

Karlo kaj Mazi en la dometo de la palaca ĝardeno.

Mazi: Kie estas la ĉambro de Silvja?
Karlo: Tie!
Mazi: Kie? En la unua etaĝo?
Karlo: Ne! En la dua.
Mazi: En la dua etaĝo estas tri ĉambroj.
Kiu estas ŝia? Ĉu tiu maldekstra?
Karlo: Tiu ne!
Mazi: Ĉu tiu dekstra?
Karlo: Ankaŭ ne tiu.
Mazi: Ĉu tiu meza?
Karlo: Jes, tiu estas ŝia ĉambro. Ŝia ĉambro estas tiu meza.

Mazi: Kies estas tiu ĉambro? Tiu en la supra etaĝo?
Karlo: Tiu estas la ĉambro de Korvaks, la komputilejo.

De Silvja = *da Silvja*

- Tiu ĉambro estas de Silvja.

Kies? = *De quem?*

- **Kies** estas tiu ĉambro?
—Tiu ĉambro estas de Korvaks.

Sceno 7

Pli da Pseŭdo-Silvjaj kopioj aperas en la komputila ĉambro.

Korvaks: Ĉesu! Ĉesu! Ne! Ne! Ne!

Sceno 8

En la dormoĉambro de Silvja.

Silvja: Ĉio... estas... en ordo!
Mi havas manĝaĵon. Mi havas horloĝojn.
Jam estas preskaŭ la sepa. Bone!
Mi malfermu la pordon... mallaŭte,
Ĉirkaŭrigardu... atente!
Kuru malsupren... rapide!

Silvja renkontas Pseŭdo-Silvja-aron.

Pseŭdo-Silvja: Saluton, Silvja!
Silvja: Saluton! ...Alia mi? Ho, estas la sepa.
Karlo atendas min! Ho! Mi... ree mi!
Reĝino: Estas la sepa horo! Vespermanĝo, Silvja!
Pseŭdo-Silvja1: Jes, panjo!
Pseŭdo-Silvja2: Jes, panjo!
Pseŭdo-Silvja3: Jes, panjo!
Pseŭdo-Silvja4: Jes, panjo!
Pseŭdo-Silvja5: Jes, panjo!
Pseŭdo-Silvjaj...: Jes, panjo! Jes, panjo. Jes, panjo. Jes, panjo!
Reĝino: Rigardu! Ĉiu estas Silvja!
Reĝo: Kiom da ili estas?

Kiel? — -e

Atent**e**, rapid**e**, mallaŭt**e**, bon**e**

Sceno 9

Kanto: "Terura afero..."



Reĝino: Tri kuiras sen ĝeno.
Akrobatas jen kvar,
Unu - apud kameno,
Kontraŭ mur' - plia par'.

Reĝo: Tiu ĉi sur foteloj
Saltas kiel simi'.
Pluraj kuras sen celo,
Sen respekto al mi!

Reĝino: Mia kor'! Miaj nervoj!
Restis neniu flor'!
Ĉiuj akvorezervoj,
Certe tuj estos for!

Reĝo: La palac' en danĝero!
Reĝino: Ili kreskas sen fin'!

Ambaŭ: Ho, terura afero!
Vera plag' trafis nin!
Ho, terura afero!
Vera plag' trafis nin!

O correlativo ***ĉiu*** *e seu plural,* ***ĉiuj****:*

- **Ĉiu** el ni lernas Esperanton. ***Cada*** *um de nós aprende Esperanto.*
  Ni **ĉiuj** lernas Esperanton. *Nós* ***todos*** *aprendemos Esperanto.*

Sceno 10

Reĝo: De kie ili ĉiuj venas ĉi tien?

Reĝino: Rigardu!
Ili ĉiuj venas el la ĉambro de Korvaks.
Li faras ion teruran! Iru tuj! Rapide!

Korvaks: Ĉesu! Ĉesu! Helpu!

Reĝo: Korvaks! Kion vi faras?

Korvaks: Mi faras nenion! Ĉion ĉi faras la komputilo!

Sceno 11

Silvja: Helpu!

Karlo: Aŭskultu!

Silvja: Helpu!

Karlo: Vokas Silvja!

Silvja: Ho, Karlo, mi tre timas!

Mazi: Kial?

Karlo: Kial vi timas?

Silvja: Ĉar estas multaj mi en la palaco.

Karlo: Multaj vi?

Mazi: Pardonu! Ĉu vi kunportis horloĝojn?

Karlo: Nu, Mazi!

Silvja: Jen por vi! Mazi, kial vi manĝas horloĝojn?

Mazi: Ĉar ili estas bongustaj!

Kial? —Ĉar...

Kial Mazi ŝatas manĝi horloĝojn?
—**Ĉar** ili estas bongustaj.

Sceno 12

Petro: Ho, ve! Li ploras. Kial vi ploras?
Knabo: Ĉar mi ne povas atingi la pomon.
Petro: Kial vi ne povas atingi ĝin?
Knabo: Ĉar mi estas malalta.
Petro: Mi atingas ĝin.
Knabo: Jes.
Petro: Kial?
Knabo: Ĉar vi estas alta.
Petro: Jes. Bonvolu.
Knabo: Dankon! Ĝis!
Petro: Hej! Ĝi estas *mia* pomo, kaj *mia* biciklo! Haltu! Haltu! La biciklo estas mia! *(Li kaptas la knabon.)* La bikiclo estas mia!
Knabo: Jes, via!
Petro: Jes, mia biciklo! Nun redonu mian pomon!
Knabo: Mi ne redonos!
Petro: Kial?
Knabo: Ĉar ĝi estas mia!



Sceno 13

Silvja: Ho, Karlo.
Karlo: Multaj Silvjaj... ho, mi scias! Korvaks! Lia komputilo!
Silvja kaj Mazi: Karlo, kien vi kuras?
Karlo: Al la komputilejo! Iru! Sekvu min!

Sceno 1

Denove en la komputilejo: la komputilo kopias multajn Pseŭdo-Silviajn.

Reĝo: Korvaks! Haltigu la komputilon!
Korvaks: Mi ne povas, Via Majesto!
Reĝo: Ho, jes! Vi povas. Ĝi estas via.
Korvaks: Jes, mia! Ĝi estas mia, sed mi ne povas haltigi ĝin.
Reĝo: Do, mi haltigos ĝin! *(al Pseŭdo-Silvjă)* Pardonu! Pardonu!
Korvaks: Atentu! Atentu!
Reĝo: Ne timu, Korvaks!
Korvaks: Ne faru tion!
Reĝo: *(en la komputilo)* Korvaks! Korvaks, helpu min!

Sceno 2

En la ĝardeno de la palaco.



Silvja: Rigardu! Alia mi!
Mazi: Kaj unu pli! Kaj tie... estas multaj vi!
Karlo: Rigardu, kiom dika!
Mazi: Tiu alia estas pli dika!
Silvja: Kiom granda!
Mazi: Sed tiu estas pli granda!
Karlo: Venu, Mazi!

Sceno 3

Petro inspektas la Pseŭdo-Silvjan paradon.

Pseŭdo-Silvja1: Mi estas granda.
Pseŭdo-Silvja2: Mi... pli granda!
Petro: La unua estas granda. La dua estas pli granda.
Pseŭdo-Silvja3: Mi estas malgranda.
Petro: Jes, la tria estas malgranda,
sed la kvara estas pli malgranda.
La kvina estas alta,
kaj la sesa estas pli alta.
La sepa estas... dika,
kaj la oka estas...
Pseŭdo-Silvja8: ...pli dika! Haha! La plej dika!

*-**ig** = fazer que algo ou alguém faça aquilo expresso na raiz:*

- La komputilo ne haltas.
  Korvaks ne povas halt**ig**i ĝin.
  La reĝo halt**ig**os ĝin.

Comparativo: **pli (ol), plej**
pli = *mais*

- pli granda *(maior),* pli kuraĝa *(mais corajoso)*
  Silvja estas alta. Mazi estas **pli** alta. Mazi estas **pli** alta **ol** Silvja.
- **plej** = *o(a) mais*
- Mazi estas la **plej** saĝa. *(o mais sábio)*

Sceno 4

La reĝo estas en la komputilo.

Reĝo: Helpu min, Korvaks!
Kovaks: Mi ne povas, Via Majesto.
Reĝo: Malsaĝulo, vi!
Korvaks: *(al si mem)* Ho, kion mi povas fari?
Ho, mi povas forkuri... Ho, jes, per helikoptero!
Reĝo: Helpu! Helpu! Korvaks! Korvaks!
Korvaks: *(al la reĝino)* Pardonu min, Via Majesto!
Reĝino: Kio okazas? Kien vi kuras?
Korvaks: Al la helikoptero.
Reĝo: Helpu!
Reĝino: Ho! La reĝo estas en la komputilo!
Korvaks! Haltu! Revenu! Korvaks!

*-**n** para movimento, direção*

- Korvaks iris supre**n**.
  Karlo iris malsupre**n**.
  Kie**n** vi kuras? —Al la helikoptero.

Karlo: Hej, haltu! Mazi, iru supren al la komputilejo.
Helpu la reĝinon! Mi haltigos Korvaks!
Mazi: Ho, pardonu min.
Silvja: Pardonu min.
Karlo: Haltu, haltu, haltu, haltu!

Sceno 5

En la komputilejo.

Reĝino: Ho! Kio estas tio?
Silvja: Ne timu! Tio estas Mazi, nia amiko. Mazi, prezentu vin!
Mazi: Via Majesto!
Reĝo: Kio okazas? Kio estas tiu objekto?
Reĝino: Ho, pardonu, tio ne estas objekto. Jen Mazi, nia amiko!

Reĝo: Li ne helpos min. Kie estas Korvaks?
Reĝino: Ho, jes. Korvaks helpos. Korvaks estas saĝa.
Reĝo: Tute ne! Li estas malsaĝulo!
Mazi: Mi helpos vin, Via Majesto!
Reĝo: Vi? Vi ne povas!
Mazi: Mi povas! *(Li manĝas parton de la komputilo.)* Bongusta!

Silvja: Kion vi faras, Mazi?
Mazi: Momenton!

-ul: *faz da pessoa aquilo expresso na raiz*

- ri**ĉul**o *(uma pessoa rica)*
- jun**ul**o *(uma pessoa jovem, um jovem)*

- Ĉu li estas saĝa?
  —Ne, li estas malsaĝ**ul**o.

Sceno 6

Reĝino: Kion vi faras, Mazi?
Mazi: Pardonu min, mi estas malsata!
Reĝino: Malsata? Sed la reĝo estas interne! Kial vi manĝas tion?

Mazi: Ĉar mi ŝatas tion. Ho, mi komprenas. Ĝi eniras tien. Ĝi eniras ĉi tien. Ho, ne!
Silvja: Atentu, mi petas, Mazi!
Mazi: Ĉio estas en ordo! Ĝi eniras tien... kaj ĝi eniras tien ĉi!

Sceno 7

Mazi: Bone, Via Majesto. Mi estas preta.
Reĝo: Ankaŭ mi! Terura varmo!
Reĝo: *(ekster la komputilo)* Ho! Nun estas pli bone!
Reĝino: Dankon, Mazi. Vi estas saĝa!
Silvja: Kie estas Karlo?
Reĝino: Karlo? Karlo, la ĝardenisto? Ho, rigardu!



Silvja: Karlo! Mia Karlo!
Reĝo: Antaŭen!
Silvja: Mi amas vin! Mi amas vin!
Mazi: Kuraĝon! Kuraĝon!
Reĝo: Brave! Brave! Bone!
Ĉiuj: Hura! Bone! Brave!
Reĝo: Nu, bone! Ni kaptis lin! Korvaks, Korvaks! Vekiĝu!
Korvaks: Kial? Kio okazas? Kiu estas vi? Kie mi estas? Kial mi estas ĉi tie? Kiu mi estas?

Sceno 8

Silvja: Vi estas Korvaks. Vi estas malsaĝa!
Korvaks: Jes, mi estas malsaĝa... Ne, ne! Mi estas saĝa.
Reĝo: Vi ne estas saĝa, Korvaks.

Karlo eniras kun gardistoj.

Karlo: *(indikas al Korvaks)* Arestu lin!
Reĝo: Jes, forportu lin!

Sceno 9

Mazi: *(al Pseŭdo-Silvja)* Staru ĉi tie. Hmm. Mi montros ion.

La Silvjaj-kopioj enkomputiliĝas.

Karlo: Ili reiras! Rigardu! Ili malaperas!

Kanto "La kopioj de Silvja"

Silvja: Kopioj tiuj.

Karlo: Estis eble mil..
Silvja: Nun reiras ciuj
Karlo: Al la komputil'.
Reĝo: Ĝojas Gondolanda reĝo...
Reĝino: **...**kaj reĝin'. Vivu Mazi Granda!
Ambaŭ: Ni admiras vin!
Silvja: Jen kopioj miaj
Karlo: Iras al maşin'.
Silvja: Unu post alia.
Ambaŭ: Sep, ses, kvin!
Karlo: Ili multaj estis,
Silvja: Jen la lastaj tri!
Karlo: Fine unusola restis.
Kiu?
Ĉiuj: Klare!
Silvja: Mi!
Ĉiuj: Hura! Hura! Hura!

Sceno 10

Kanto: Amkanto

Silvja, Karlo: Nia historio
al feliĉa fin'
venas nun pro tio,
ke mi amas vin!

Petro: Kiu estas tiu knabino?
Kio ŝi estas?
Kie ŝi vivas?
Kiam ni revidos ŝin?
Kial mi estas ĉi tie?

Sceno 11

Geedziĝa sceno

Silvja, Karlo: Ĝis la vivofin'
mi amos vin!

Sceno 12

Korvaks laboras.

Mazi: Tio iras tien, ĉi tio - ĉi tien.

Korvaks: Kompatinda mi!

Mazi: Tiun.

Korvaks: Tiun ĉi?

Mazi: Ne, la grandan.

Korvaks: Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve!

Mazi: Nun prenu tiun.

Korvaks: Tiun ĉi?

Mazi: Kaj tiun alian!

Korvaks: Terura laboro!

Mazi: Mi tagmanĝas nun!

Korvaks: Ankaŭ mi malsatas.

Mazi: Enpaku ĉiujn ĉi!

Korvaks: Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve! Ho, ve!



Sceno 13

Kanto: "La adiaŭa"

Mazi: Ĉio pasis bone, do mi iras for!

Reĝo: Dankon, Granda Mazi! Ploras mia kor'!

Ĉiuj: Ĝis revido! Ĝis! Adiaŭ, kara Mazi!
Nun adiaŭas vin - Reĝo, Reĝino, Silvja, Karlo!
Korvaks, Petro!
Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ!
Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ! Adiaŭ!
...

http://slidepdf.com/reader/full/mazi-en-gondolando